**N I A V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **MAJO 2000**
Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

**59-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO- HEF KONGRESO**
**29a Aprilo ĝis 1a de Majo 2000. San Sebastián de los Reyes (Madrid)**

## EKSTERLANDE

La 2ª Kongreso de la Eŭropaj Verdaj Partioj (Parizo) aprobis rezolucion favore al esperanto. La teksto estis akceptita de la Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj. "esperanto devus esti elektebla kiel opcio en eŭropaj lernejoj, ĉar ĝi estas neŭtrala kaj facile lernebla", "esperanto devus iĝi unu el la oficialaj lingvoj de la Eŭropa Unio-sistemo kiam la principo de la egalrajteco de la lingvoj devas esti haltigata"

## HISPANIO

En aprilo okazis debato pri Esperanto en la Aŭtonoma **Madrida** Universitato. Organizis la Asocio por Esperanto-Diskonigo de la Universitato, prelegis Jorge Camacho kaj Amanda Higley (usonanino, kiu vojaĝis en Eŭropo pere de Pasporta Servo), kaj Marco Trevisan. Partoprenis ok universitatanoj el diversaj fakultatoj.

Dum marto okazis en **Gijón** la 2ª Festo de la lingvoj, Astura Esperanto-Asocio ne nur disponis standon sed ankaŭ prezentis la prelegon "Necesidad de una lengua internacional a través de la historia" fare de Mª José Álvarez.

Aitor Arana prezentis en **Vitorio** lian esperantan tradukon de la verko "Memoraĵoj de eŭska bovino". Alava Esperanto-Asocio aperigis trilingvan libron (esperanta-eŭska-hispana) kun du rakontoj de Ignacio Aldecoa, unu el la rakontoj esperantigis **Miguel Fernández.**

Ricardo-Felipe Albert Reyna tradukis al la hispana la libro "Fundamenta Instruo de Uonbulismo". Ĉar la originalo estas en la korea, li uzis la esperantan version kiel ponto-lingvo.

## OFICIALE

La lernojaron 2000/2001 en la Escuela de Magisterio de **Bilbao** (Universidad del País Vasco) estos oficiale agnoskita esperanto-kurso, kiel elektebla studobjekto (4,5 kreditoj)

En la Filologia Fakultato de **La Laguna**, Alejandro López de Vergara direktis oficialan e-kurson (3 kreditoj). Diversaj membroj de la loka grupo ESTO prelegis pri la esperanto-movado.

En la kultura kadro de la 8ª Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. Blanes (Girona) 30ª de septembro-7ª de oktobro, okazos **ILEI-ekzamenoj**, je elementa nivelo, gvidataj kaj kontrolataj de Carla de Lorenzi, estraranino de ILEI.

## FUNDACIÓN ESPERANTO

La Patronaro de la Fondaĵo subvenciis jenan agadon:

Kultura Asocio Esperantista (Sabadell) 40.000 ESP Elementa kurso ĉe Autonoma Universitato de Barcelona dum 1999.

Grupo Esperantista de Bilbao. 46.000 ESP Donaco de libroj al Kultura Centro kaj aranĝo de konstanta inform-telefono

Grupo Esperantista de Córdoba 80.000 ESP Kurso ĉe Asociación Cordobesa de Intérpretes de la Lengua de Signos (surdmutuloj)

Hispana Esperanto Federacio 80.000 ESP Expolingua 1999-2000

Grupo de Esperanto de Valencia 80.000 ESP Vojaĝo al Festivalo de Popolaj Orkestroj en Pollando



**ESPERANTO EN INTERRETO**

Kompanio Netscape havas paĝon kun la nomo DMOZ, en kiu aperas ligiloj al retpaĝoj en ĉiuj lingvoj (escepte angla). Je dato 29a Marto, Esperanto havas en tiu paĝo 1.015 ligilojn, ĝuste apud la dana, kun 1.010. Ŝajnas bonega pozicio, se oni konsideras la kvanton de gravaj lingvoj kia la franca (17.006) au hispana (30.409). La ciferoj varias ĉiutage. Estas leganto de sce, Klivo, kiu atentigis pri ĉi paĝo: http://dmoz.org/World/

La parolistino de Radio Nacional kiu simpatias al Esperanto (Pilar Socorro) havas jenan adreson http://www.pilarsocorro.com/ kun ligiloj al du adresoj pri Esperanto (la Multlingva Informa Paĝo pri Esperanto kaj al la paĝo pri kursoj de HEF). Esperantisto el Tenerife, laŭ la nomo "Omar Rajan" multfoje interparolas kun ŝi pere de la babilejo kiun ŝi subtenas meznokte.

Jen la ret-paĝo de eurocom pri plurlingvismo en Eŭropo, ĝi liveras verŝajne interesajn argumentojn:http://www.eurocom-frankfurt.de/spanisch.htm

Novan ret-paĝon de Jesús de las Heras: www.iberprofe.com/webs/esperanto.html

ESPERANTO EN AMASKOMUNIKILOJ

La revuo "Galea" de Getxo (Bilbao) aperigos artikolon pri esperanto.

Laŭ invito de TV2, Barcelona Esperanto-Centro partoprenis en la ellaborado de aparta programo de "Saber y ganar" dediĉita al lingvoj

La programo "Solidaris" de la TV.Punt2-Valenciana, intervjuis al A. Casquero kaj aliaj valenciaj kaj eksterlandaj esperantistoj, ĝi estis tre favora al esperanto.

Canal-54, TV de Baix Llobregat, prezentis gvidata de Martí Guerrero i Cots, kurson de esperanto.

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Kursoj: Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18. Por triaaĝuloj.
Universidad Autónoma de Madrid. Lunde kaj merkrede 12-13h.
Informas Marco Trevisán 915 617 613 <oxartum@esperanto.nu>

Prelego: 10a majo. 18,30 h "Esperanto: fenómeno de la comunicación" M. Parra parolos en la Centro Cultural Maestro Alonso ( Maestro Alonso n-ro 6-Ventas)

HEF ANGULO

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: admin@esperanto-es.org

NI ATENDAS VIN EN SAN SEBASTIÁN DE LOS REYES

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::